
KONGRESA KURIERO

# DRAKO DE BRNO

7

2025-08-02

de la 110-a Universala Kongreso de Esperanto en Brno 26 julio – 2 aŭgusto 2025



## Rezulto de la Belartaj Konkursoj de UEA 2025

Estis aljuĝitaj la agnoskoj (premioj kaj honoraj mencioj) de la 76-a eldono de la Belartaj Konkursoj de UEA (BK). Gvidis la BK-ceremonion en la 110-a Universala Kongreso de Esperanto la nov-elektita Prezidanto de UEA, Fernando Maia Jr., surbaze de materialo preparita de la sekretario de la BK, Miguel Gutiérrez Adúriz. Konceptis la ceremonion la sekretario kaj la prezidanto de la BK, respektive Miguel Gutiérrez Adúriz kaj Miguel Fernández (kiu registris videon). La agnoskoj estis:

### BRANĈO POEZIO

**Juĝkomisiono:** Krys Williams, István Ertl, Mao Zifu

**Partoprenis** 39 verkoj de 21 aŭtoroj el 13 landoj [10 el Afriko, 2 el Ameriko, 2 el Azio, 25 el Eŭropo].

**La unua premio** estas aljuĝita al “Al mia unua instruistino nun 90-jara...” de Benoît Philippe el Germanio.

**La dua premio** estas aljuĝita al “Amara bukedo” de Nicolau Dols el Hispanio.

**La tria premio** estas aljuĝita al “Aŭdu” de Benoît Philippe el Germanio.

**Honora mencio** estas aljuĝita al “La fia komedio” de Gonçalo Neves el Portugalio.

**Honora mencio** estas aljuĝita al “Buĉado” de Gonçalo Neves el Portugalio.

**Honora mencio** estas aljuĝita al “Poacoj sur roko” de Choe Taesok el Litovio/Koreio.

### BRANĈO PROZO

**Juĝkomisiono:** Trevor Steele, Julian Modest, Anina Stecay

**Partoprenis** 47 verkoj de 28 aŭtoroj el 16 landoj [11 el Afriko, 5 el Ameriko, 26 el Eŭropo].

**La unua premio** estas aljuĝita en egaleco al “Plagiato” de Jorge Rafael Nogueras el Usono/Portoriko kaj “Ridindaj amaferoj” de Debra Hamel el Usono.

**La dua premio** estas aljuĝita al “La malfacila vivo dum la milito” de Jean de Dieu Kikako el D. R. Kongo.

**La tria premio** estas aljuĝita al “Kiam flugilo rompiĝas” de Wei Yubin el Ĉinio.

### BRANĈO MIKRONOVELO

**Juĝkomisiono:** Trevor Steele, Nicola Ruggiero, Antonio Valén

**Partoprenis** 43 verkoj de 20 aŭtoroj el 13 landoj [8 el Ameriko, 8 el Azio, 27 el Eŭropo].

**La unua premio** – premio Paula Adúriz – estas aljuĝita al “¡” de Steven Cybulski el Usono.

**La dua premio** estas aljuĝita al “Mortigo de Mnemozino” de Tatjana Auderskaja el Ukrainio.

**La tria premio** estas aljuĝita en egaleco al “Kreema Infano” de Lurdes Oliveira el Portugalio kaj “Ne krokodilu!” de Debra Hamel el Usono.

**BRANĈO TEATRAĴO**

**Juĝkomisiono:** Saša Pilipović, Georgo Handzlik, Alena Adler

**Partoprenis** 5 verkoj de 5 aŭtoroj el 5 landoj [1 el Ameriko, 1 el Azio, 3 el Eŭropo].

**La unua premio** estas aljuĝita al "Civilizita konversacio" de Jorge Rafael Nogueras el Usono/Portoriko.

**La dua premio** estas aljuĝita al "Ara" de Evgenij Georgiev el Kazaĥio.

**La tria premio** estas aljuĝita al "Dominiko Orban en la infero" de Laimundas Abromas el Litovio.

**Honora mencio** estas aljuĝita al "Mi estas Neniulo" de Ralph Glomp el Germanio.

**SUBBRANĈO MONOLOGO/SKEĈO**

**Juĝkomisiono:** Saša Pilipović, Georgo Handzlik, Alena Adler

**Partoprenis** 4 verkoj de 4 aŭtoroj el 4 landoj [1 el Ameriko, 2 el Azio, 1 el Eŭropo].

**La unua premio** – premio María Cuevas – estas aljuĝita al "Bopatrino – superheroo, surhavanta antaŭtukon" de Evgenij Georgiev el Kazaĥio.

**La dua premio** estas ne aljuĝita.

**La tria premio** estas ne aljuĝita.

**INFANLIBRO DE LA JARO**

**Juĝkomisiono:** Ricardo Albert Reyna, Edmund Grimley kaj Martin Markarian

Partoprenis 4 infanlibroj de 4 eldonejoj el 4 landoj [3 el Eŭropo – 1 el Oceanio].

**La premio "Infanlibro de la jaro"** estas aljuĝita al la Eldonejo "ZIRIA", pro la verko "Vivo" de Roberto Pérez-Franco, ilustrita de Margarita Cubino kaj tradukita de Norberto Díaz Guevara.

**BRANĈO ESEO**

**Juĝkomisiono:** Gotoo Hitoshi, Antonio Valén, Giridhar Rao

**Partoprenis** 7 verkoj de 6 aŭtoroj el 6 landoj [7 el Eŭropo].

**La unua premio – premio Luigi Minnaja –** estas aljuĝita al "Semantika potenco de Esperanto: de kombineblo al signifo" de Toni Espinosa el Hispanio.

**La dua premio** estas ne aljuĝita.

**La tria premio** estas ne aljuĝita.

**BRANĈO KANTOTEKSTO**

**Juĝkomisiono:** Ankie van der Meer, Flavio Fonseca kaj Miguel Fernández (kiel laŭokaza anstataŭanto de Ĵak Le Puil)

**Partoprenis** 14 verkoj de 6 aŭtoroj el 6 landoj [4 el Azio, 10 el Eŭropo].

**La unua premio** estas aljuĝita al "Ploras la ĉiel'" de Petro Palivoda el Ukrainio.

**La dua premio** estas aljuĝita al "Amhistorio" de Petro Palivoda el Ukrainio.

**La tria premio** estas aljuĝita en egaleco al "Nedeca tango" de Ewa Barbara Grochowska el Francio kaj "Ĝuu la vivon" de Ewa Barbara Grochowska el Francio.

Miguel Gutiérrez Adúriz
Sekretario de la Belartaj Konkursoj de UEA

## Ĵaŭda futbala matĉo

inter lokuloj kaj la esperantista teamo (ĉiumomente 6 ludantoj kontraŭ 6) finiĝis neŭtrale 5:5, sed sekvis t.n. punŝotoj, en kiuj estis pli sukcesaj la esperantistoj.

## Teatro kaj koncertoj

Ĵaŭde posttagmeze okazis la teatraĵo Lampiroj en prezento de infana ensemblo DOMA el Svitavy kaj vespere koncertoj de La Perdita Generacio kaj de Jolana Haan-Smyčková kaj Richard Haan kun iliaj filoj.

## Filmoj

Vendrede estis projekciataj filmoj kun esperantlingvaj subtekstoj: teatra registraĵo *Longulo, Larĝulo kaj Miopulo* de la ĉeĥa Teatro de Jára Cimrman, kaj pupteatro *Petro kaj La Lupo* laŭ muziko de S. Prokofjev.

## Viajn fotojn de la UK

alŝutu al la komuna Google-albumo:

# Rezultoj de la Sciencaj Konkursoj Pirlot kaj Power

Dum la Scienca Forumo okazinta vendrede posttagmeze estis disdonita la Premio Pirlot por la plej bonaj sciencaj libroj de la jaro. Aldone, ĉi-jare estis disdonita nova Premio Charles Power por la plej bonaj sciencaj prelegoj de la jaro. Premio Power estis aljuĝita en du kategorioj: longaj prelegoj (kiel IKU) kaj mallongaj prelegoj (kiel Scienca Kafejo). Jen la gajnintaj verkoj elektitaj de la ĵurio:



### Premio Pirlot (scienca libro):

**Unua loko:** *Astronomio kaj Astrofiziko por ĉiuj*, Amri Wandel kaj Karlo Spinola
**Dua loko:** *La IKU-libro 2025*, red. A. Striganova, D. Shevchenko kaj A. Wandel
**Tria loko:** *La Rivoluoj de la Ĉielaj Korpoj*, trad. R. Foessmeier kaj H. M. Maitzen

### Premio Power (longa scienca prelego):

**Unua loko:** *La teknologio de Spacvojaĝado kaj Esplorado*, Amri Wandel
**Dua loko:** *La ambigueco de Nombro-informo*, Ekaterina Bebenina
**Tria loko:** *Multlingva temvortaro helpata per AI*, Ilona Koutny

### Premio Power (malonga scienca prelego):

**Unua loko:** *Gregor Mendel*, Judith Jackson
**Dua loko:** *Knabeto Savita de Auschwitz*, Thomas Bormann
**Tria loko:** *Arkivistiko kaj Esperanto*, Ruben Fernandez

## AIS-atestoj por ekzamenitoj

Krome estis publike disdonitaj la atestoj por la du AIS-IKU-kursoj, en kiuj okazis ekzamenoj. Tri atestoj en la kurso “La ambigueco de Nombroinformo”, kaj 31 atestoj en la kurso “La teknologio de Spacvojaĝado kaj Esplorado”. Partoprenintoj en la ekzamenoj, kiuj ne ĉeestis la publikan disdonon, povos preni sian atestojn sabate antaŭ aŭ post la Solena Fermo ĉe la enirejo de la salono Zamenhof.

## Faka Forumo

Ĵaŭde posttagmeze prezentis sin pli ol 30 Fakaj Asocioj dum la Faka Forumo, kunordigita de Amri Wandel. La forumo daŭris unu horon kaj duonon kaj estis registrita. Interalie oni diskutis rilatajn temojn, kiel la planita Almanako (A. Kadar) kaj la revigiligo de ISAE (A. Wandel).

## Sciencaj Aŭkciaj objektoj

En la Aŭkcio, kiu sekvis la Sciencan Forumon, estis kontribuitaj pluraj artikloj rilataj al sciencaj verkoj kaj rezultoj. Kiel ĉiam estis aŭkciita la IKU-libro kun la subskriboj de ĉiuj ĉeestantaj prelegantoj. Aldone unuafoje estis aŭkciitaj la gajnintaj libroj en la Premio Pirlot kaj la atesto-triopoj por la Premio Power. Fine Akademio Internacia de la Sciencoj ofertis la AIS-kravaton.

Amri Wandel



## Revenu gasti en Brno!

Mi estas gastiganto de Pasporta Servo en Šlapanice apud Brno. Mi havas tri infanojn, kiuj denaske parolas Esperanton kaj partoprenis la UK-n. Bedaŭrinde ni malofte ricevas Esperanto-parolantajn gastojn. Se Brno kaj la regiono plaĉis al vi kaj vi deziros reveni, kontaktu min per retpoŝto:

pasportaservo@blahus.cz

Marek Blahuš, KN 60

## Moravia Landa Biblioteko

en Brno estas la dua plej granda biblioteko en Ĉeĥio post la Nacia Biblioteko en Prago, sed kun la plej granda kolekto de Esperanto-libroj. Aktuale ĝi proponas 2037 titolojn, sed en la deponejo atendas ankoraŭ 3 mil pliaj, donacitaj de la Esperantista klubo en Brno. La bibliotekistoj ilin registras iom post iom. Ili estos prilaboritaj kaj deponitaj profesie kaj je dispono de ĉiuj registritaj legantoj kaj per interbiblioteka servo ankaŭ al legantoj de aliaj bibliotekoj. Estas tie ne nur lerniloj, sed ankaŭ beletro tradukita kaj sufiĉe reprezenta literaturo originala. KN66

## Teatro de muziko kaj poezio AGADIR en Brno

havas nekutiman labormanieron. Ili invitas dum la jarsezono tri eksterlandajn poetojn, kiuj estas en sia lando persekutataj aŭ estis arestitaj pro sia konvinkiĝo, aŭ eĉ vivas en ekzilo. El ilia poezio oni preparas kaj prezentas teatraĵojn, en kiuj rolas neprofesiaj aktoroj, kaj fine de la sezono estas el ĉi tiuj teatraĵoj preparita video. La nunjaran vi povas spekti per Youtube ĉe:

https://youtu.be/4edfttFu4KM

Haveblas Esperantaj subtitoloj, sed necesas ilin mane elekti en la agordoj. Pliaj informoj riceveblas kaj opinioj atendatas ĉe KN 192.

## Muzeo de la romaa kulturo

Se vi ne partoprenis la ekskurson al la romaa muzeo, vi povos viziti ĝin dum via plia restado en Brno. La muzeo havas je dispono esperantlingvan tradukon de la libro *El la romaa historio*, kiu aĉeteblas ankaŭ en la kongresa libroservo. Adreso: Bratislavská 246, Brno, lunde fermite, mardo ĝis sabato 10h00–18h00. KN 66

## Moravia Landa Muzeo

ĉe la placo *Zelný trh* nuntempe prezentas unu el la plej antikvaj statuoj en la mondo, la *Venuson de Věstonice* – virinan statueton, kiun antaŭ 25 mil jaroj skulptis loka prahomo. Samteme estas tie ekspozicio pri Antonio Salieri (1750–1825), kiu ne venenis W. A. Mozart, malgraŭ tiaj kalumnioj.

## Loka Esperanto-klubo

havas la retejon www.esperantobrno.cz kaj kunvenas inter septembro kaj junio ĉiu-semajne merkrede 18–19h, unu semajnon rete kaj la alian ĉeeste ĉe Hybešova-strato n-ro 65. En la retejo vi trovos la programon, niajn videojn kaj adreson de la kluba komitato. Novaj membroj bonvenaj.

klubakomitato@esperantobrno.cz

## Ĉeĥa Esperanto-Asocio

kiel kuorganizanto de la kongreso havas la retejon www.esperanto.cz, en kiu ĝi proponas servojn, kursojn, libroservon, bibliotekon, viziton de la Esperanto-muzeo en Svitavy, aktualajn informojn pri la agado de ĉeĥaj esperantistoj kaj pli. Vizitu!




**Ĝis revido la 1-an de aŭgusto 2026**
**en la 111-a UK en Graco!**

Adiaŭas vin la redaktoro: Miroslav Malovec kaj la provleganto: Marek Blahuš